
# La scenurbo de la XII[a] Kongreso de la Ka
# Internaciaj F

Palma de Mallorca!.... Nomo kiu elvokas rememorojn pri estintaj gloroj en ĉiu spirito kataluna!.... Via gotika katedralo, kies belŝajnaj turpintoj reflektiĝas en la trankvila akvo de la haveno, diras al ĵus alveninta vizitanto ion pri la plej prospera epoko de nia historio.

La reĝa palaco, fortikaĵo Templaris, kastelo Bellver kaj centoj da diversaj detaloj, prezentas al ni rememoron pri tiu tempo en kiu Katalunujo estis unu el la ĉefaj ŝtatoj apud la Mediteranea Maro.

Sed nomante vin, Palma de Mallorca, estas ja kvazaŭ oni nomas vian tutan insulon, kaj kio plej ĉarma faras vin estas la naturbelaĵoj sidantaj ĉirkaŭ vi por revigi la maristojn, kiuj albordiĝas por ripozado.

Kiam neniu homa piedo surpaŝis vian teron, dekojn da jarcentoj an-



Ĝenerala vidaĵo


# ...luna Esperantista Federacio, kaj de la XI[aj] ...Floraj Ludoj

## PALMA DE MALLORCA


taŭe, kiam via unua loĝanto ne estis stariginta ankoraŭ la unuan *dolmenon*, jam la naturo ĉizadis en via internaĵo, en la subtera mallumo, la mirindajn loĝejojn de gnomoj kaj feinoj, la senkomparajn grotojn kaj kavernojn Artà kaj Monacor.

Kaj sur via supraĵo la ondegoj modelis viajn abruptajn marbordojn, kaj formiĝis viaj ĉarmaj valoj parfumitaj de oranĝujoj kaj citronarboj.


Rigardinte vin kaj viajn fratinojn, la ceterajn balearajn insulojn, oritajn de la suno, kronitajn de mara ŝaŭmo elirinta el la ondoj kvazaŭ aro de ravaj sirenoj, la genio - fantazio de nia plej glora poeto, Jacint Verdaguer, enkorpigis la spiritan legendon pri via kreado, indan je la klasika mitologio.




...la urbo kaj haveno.



Katedralo. – Flanka aspekto.



Vidaĵo de «Les Illetes», marbordo apud Palma.




Eksteraĵo de la Kastelo Bellver.